Friedrich Schiller,

# Al la ĝojo

*tradukita de Joachim Gießner*

Ĝojo! Vi fajrero dia,
d'Elize' filino vi!
En sanktej' benita via
arde vin omaĝas ni.
Sorĉe ligas vi beate,
se disigis malraci'.
Hom' al hom' estiĝas frate,
kie milde regas vi.

.....
.......................
.......................
.......................
.......................

Kiu de amik' fidela
nomas sin amik' de li,
kiu kun edzin' anĝela
vivas, jubiladu pli,
eĉ, se nur al unu koro
ie ligas lin inklin'.
Sed aliaj ja kun ploro
el la lig' forŝtelu sin.

.....
.......................
.......................
.......................
.......................

.......................
.......................
.......................
.......................
.......................
.......................
.......................

. . .

Friedrich Schiller,

# Al la ĝojo

*tradukita de Kálmán Kalocsay*

Ĝoj'! Fajrero belradia!
Elizea di-filin'!
fajrebrie ni al via
templo iras, preĝi vin.
Ĉesu, de vi sorĉligate
de l' rigora mod' la ŝir',
ĉiuj homoj sentas frate,
se vi ŝirmas per flugil'.

Ĥoro:
Jen brakumoj al milmiloj,
Jen ĉi kis' al tuta mond'!
Fratoj! super stela rond'
loĝas patro por ni, filoj!

Se la granda ĵet' bontrafis
kaj amikon gajnis vi,
se virina am' vin ravis:
Vin enmiksu kun ĝojkri'!
Jes, se eĉ nur unu koro
estas via en la mond'!
Kaj se ne – do vin kun ploro
ŝtelu for el nia mond'.

Ĥoro:
Ĉiu sub ĉielo glata
donu sin al simpati',
al la steloj gvidas ĝi,
kie tronas Nekonata.

Ĉiu sur la brust' Natura
suĉas sukon de la ĝoj'
kor' malbona, koro pura
sekvas ŝin laŭ roza voj'.
Ŝi vinberojn, kisojn donas
kaj amikon sen pridub',
en volupt' la vermo dronas,
vidas Dion la kerub'.

. . .

Friedrich Schiller,

# An die Freude

Freude, schöner Götterfunken,
Tochter aus Elysium,
Wir betreten feuertrunken,
Himmlische, dein Heiligtum.
Deine Zauber binden wieder,
Was die Mode streng geteilt;
Alle Menschen werden Brüder,
Wo dein sanfter Flügel weilt.

Chor:
Seid umschlungen, Millionen!
Diesen Kuß der ganzen Welt!
Brüder - überm Sternenzelt
Muß ein lieber Vater wohnen.

Wem der große Wurf gelungen,
Eines Freundes Freund zu sein,
Wer ein holdes Weib errungen,
Mische seinen Jubel ein!
Ja - wer auch nur eine Seele
Sein nennt auf dem Erdenrund!
Und wer's nie gekonnt, der stehle
Weinend sich aus diesem Bund.

Chor:
Was den großen Ring bewohnet,
Huldige der Sympathie!
Zu den Sternen leitet sie,
Wo der Unbekannte thronet.

Freude trinken alle Wesen
An den Brüsten der Natur;
Alle Guten, alle Bösen
Folgen ihrer Rosenspur.
Küsse gab sie uns und Reben,
Einen Freund, geprüft im Tod;
Wollust ward dem Wurm gegeben,
Und der Cherub steht vor Gott.

. . .

| | | |
|---|---|---|
| ..... | Ĥoro: | Chor: |
| ....................... | Ĉu genuas vi, milmiloj? | Ihr stürzt nieder, Millionen? |
| ....................... | Vi kreinton sentas, mond'? | Ahnest du den Schöpfer, Welt? |
| ....................... | Serĉu super stela rond', | Such' ihn überm Sternenzelt! |
| ....................... | loĝas Li trans astro-briloj! | Über Sternen muß er wohnen. |
| | | |
| Ĝojo estas la risorto | En eterno de l' Naturo | Freude heißt die starke Feder |
| en eterna la natur'. | Ĝojo estas la risort'. | In der ewigen Natur. |
| Ĝojo jen per sia forto | En la mondhorloĝ' por kuro | Freude, Freude treibt die Räder |
| movas l'universon nur. | radojn pelas ŝia fort'. | In der großen Weltenuhr. |
| Florojn el burĝonoj logas, | Ŝi el ĝermoj logas berojn, | Blumen lockt sie aus den Keimen, |
| sunojn, astrojn puŝas ĝi. | sunojn regas ŝia gvid' | Sonnen aus dem Firmament, |
| Sferojn forajn ĝi apogas | Ŝi tra l' spaco rulas sferojn | Sphären rollt sie in den Räumen, |
| en senfina galaksi'. | trans la astronoma vid'. | Die des Sehers Rohr nicht kennt. |
| | | |
| ..... | Ĥoro: | Chor: |
| ....................... | Kiel sur la pompaj vojoj | Froh, wie seine Sonnen fliegen |
| ....................... | sunoj sur la firmament', | Durch des Himmel prächt'gen Plan, |
| ....................... | gaje marŝu, frata gent', | Wandelt, Brüder, eure Bahn, |
| ....................... | kiel venki la herooj! | Freudig, wie ein Held zu Siegen. |
| | | |
| ....................... | Esploriston ŝi alridas | Aus der Wahrheit Feuerspiegel |
| ....................... | el la fajrspegul' de l' Ver', | Lächelt sie den Forscher an. |
| ....................... | sur krutaĵ' de l' Virto gvidas | Zu der Tugend steilem Hügel |
| ....................... | ŝi la homon de toler', | Leitet sie des Dulders Bahn. |
| ....................... | sur Kred-Monto sunobrila | Auf des Glaubens Sonnenberge |
| ....................... | flirtas ŝia flag' el or', | Sieht man ihre Fahnen wehn, |
| ....................... | ŝin tra l' fendo ĉerk-kovrila | Durch den Riss gesprengter Särge |
| | vidas ni en anĝel-ĥor'. | Sie im Chor der Engel stehn. |
| | | |
| ..... | Ĥoro: | Chor: |
| ....................... | Ho toleron, paciencon, | Duldet mutig, Millionen! |
| ....................... | fratoj, por pli bona mond'! | Duldet für die bessre Welt! |
| ....................... | Donos super stela rond' | Droben überm Sternenzelt |
| ....................... | granda Dio rekompencon! | Wird ein großer Gott belohnen. |
| | | |
| ....................... | Ĉu pripagi diojn? Vanto! | Göttern kann man nicht vergelten; |
| ....................... | Ĉu simili? Bela pen'! | Schön ist's, ihnen gleich zu sein. |
| ....................... | Venu ĝoji kun ĝojanto | Gram und Armut soll sich melden, |
| ....................... | la mizero, la ĉagren'. | Mit den Frohen sich erfreun. |
| ....................... | Venĝ'? Kolero? En forgeson! | Groll und Rache sei vergessen, |
| ....................... | Jen pardon' al malamik'! | Unserm Todfeind sei verziehn. |
| ....................... | Liaj larmoj havu ĉeson, | Keine Träne soll ihn pressen, |
| | lin ne boru pento-pik'. | Keine Reue nage ihn |
| | | |
| ... | ... | ... |

| | | |
|---|---|---|
| ..... | Ĥoro: | Chor: |
| ....................... | En ŝuldlibroj plu nenio! | Unser Schuldbuch sei vernichtet! |
| ....................... | Mondon regu harmoni'! | Ausgesöhnt die ganze Welt! |
| ....................... | Fratoj! Kiel juĝis vi, | Brüder - überm Sternenzelt |
| ....................... | tiel juĝos pri vi Dio! | Richtet Gott, wie wir gerichtet. |
| | | |
| ....................... | Ĝojo ŝaŭmas en pokaloj, | Freude sprudelt in Pokalen, |
| ....................... | en orsango de l' vinber', | In der Traube goldnem Blut |
| ....................... | mildon trinkas kanibaloj, | Trinken Sanftmut Kannibalen, |
| ....................... | heroecon malesper'. | Die Verzweiflung Heldenmut - - |
| ....................... | Se rondiras la botelo, | Brüder, fliegt von euren Sitzen, |
| ....................... | fratoj, saltu el la sid', | Wenn der volle Römer kreist, |
| ....................... | ŝprucu ŝaŭmo al ĉielo: | Laßt den Schaum zum Himmel spritzen: |
| | Jen ĉi glas', por Bon-Spirit'! | Dieses Glas dem guten Geist! |
| | | |
| ..... | Ĥoro: | Chor: |
| ....................... | Himnas Lin abismo stela, | Den der Sterne Wirbel loben, |
| ....................... | serafar' kun glora cit'. | Den des Seraphs Hymne preist, |
| ....................... | Jen ĉi glas' por Bon-Spirit', | Dieses Glas dem guten Geist |
| ....................... | supre, trans la tend' ĉiela! | Überm Sternenzelt dort oben! |
| | | |
| ....................... | En suferoj: firma forto, | Festen Mut in schwerem Leiden, |
| ....................... | al senhelpaj: ŝirma brust', | Hilfe, wo die Unschuld weint, |
| ....................... | eternec' al ĵura vorto, | Ewigkeit geschwornen Eiden, |
| ....................... | eĉ al malamiko: just'. | Wahrheit gegen Freund und Feind, |
| ....................... | Virfiero kontraŭ tronoj, | Männerstolz vor Königsthronen, - |
| ....................... | kvankam sangon kostu spit', | Brüder, gält' es Gut und Blut - |
| ....................... | al merito estu kronoj, | Dem Verdienste seine Kronen, |
| | kaj pereo al insid'! | Untergang der Lügenbrut! |
| | | |
| ..... | Ĥoro: | Chor: |
| ....................... | Fermu vin en sankta rondo, | Schließt den heil'gen Zirkel dichter, |
| ....................... | Ĵuru do kun glaso-lev', | Schwört bei diesem goldnen Wein, |
| ....................... | pri l' fidelo al la Dev', | Dem Gelübde treu zu sein, |
| ....................... | je l' Reganto de l' Stel-Mondo! | Schwört es bei dem Sternenrichter! |
| | | |
| *Traduko de la Germana poemo "An die Freude" de* FRIEDRICH SCHILLER *(Frederiko Ŝilero, ∗1759 – †1805) en Esperanton de* JOACHIM GIESSNER *(∗1913-12-23 – †2003-11-25).* | *Traduko de la Germana poemo "An die Freude" de* FRIEDRICH SCHILLER *(Frederiko Ŝilero, ∗1759 – †1805) en Esperanton de* KÁLMÁN KALOCSAY *(Kalmano Kaloĉajo, ∗1911 – †1976) en 1958.* | *Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* FRIEDRICH SCHILLER *(Frederiko Ŝilero, ∗1759 – †1805).* |
| *Arg-133-889 (2008-02-27 19:35:47)* | *Arg-133-263 (2004-01-16 21:13:09)* | *Arg-133-262 (2004-01-16 21:17:16)* |